



PENSEO

N-ro 384

okt. / 2023

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Tiberio Madonna (Italio)



Frenezo

Vi esperis
ke mi venos
mi venis
vi kaŝis vin
mi foriris...
mi esperis
ke vi ne estos
mi bedaŭris
ke vi ne estas
mi vokis vin
en la ondoj...
mi malesperis
ke vi ne estis
mi kriis al vi
en la ondoj...
en la nokto
en la ondoj
ondiĝantaj
fluantaj
ĝis vi
surda.
Vi silentigis min.
Mi forveturis
mi alvenis
sub alian ĉielon.
Mi vokis vin.
Vi vokis min
kripte
kiam mi estis jam
aliloke.
For.
De vi.
Lontane.

Ángel Arquillos (Hispanio)



Via lumo

Nur via lumo lumigas
mian senfinan solecon
kaj gajigas la malĝojon
kaj la malbonajn momentojn.
Nur via lumo lumigas
miajn fantaziajn sentojn
kaj kun trankvileco; mi transiras
la muron de la turmentoj.
Nur via lumo lumigas
la vojon de la ĝardenoj,
kie rozoj kaj lekantoj
alkondukas miajn paŝojn.
Nur via lumo lumigas
de la senfina ĉielo
ĝis la limo de la vivo
kie estas mia celo.

Moissey Bronshteyn (Rusio)



El Israelaj skizoj

Jerusalemo pluva, do sen ŝminko
sed ja kun belo,
venigas min al firmo de konvinko,
ke Israelo,
mem elektinta daŭre evolui
kaj plu progresi,
deziras ankaŭ vivbelecon ĝui.
Se emus ĉesi
la kontraŭstaroj ardaĵ multjardekaj
de l' du popoloj,
se unuiĝus ambaŭ fortoj de, kaj

eĉ ambaŭ voloĵ,
 se pacaj konsumajtoj, ne misiloj
 kreas kune,
 atingus do sukcesojn vere brilajn
 la lando, ĉu ne?
 ...Do, incitanta tiun kontraŭ tiu,
 TV-fatraso,
 ĉu apartenas, viaopinie,
 al homa raso?

Barelo en montara kroata bieneto,
 paciga etosumo, alies viv-kvieto,
 leĝera prelegado, aŭskulto kaj atento,
 kaj laŭ viteja pado paŝado kun kontento...

Mi restas senespere en nia nuno nigra,
 sed dum rememorado pri la antaŭo migra
 min trafas ĝua piko en la profundo mensa,
 kaj pro l' ĝuindaj tagoj mi dankas vin,
 Spomenka!



Animo pura kaj animo putra
 egale venas al kares' aŭ pun' tra
 la brulan pordon de l' purgatorio,
 de tiu vojo savos nin nenio.

Arogantulo kun la kora rusto
 supozas ke, se grandas lia ruz' do
 ĝi helpas elturniĝi ajnaloke –
 sed la destino lin observas moke,
 kaŝante la rideton...

Libervole paŝanta laŭ la eĝo tranĉila,
 nur per kredo protektas dum paŝad' tiu mi la
 kompatindajn kalkanojn; ete helpas la kredo,
 la truhavaj pantofloj ankaŭ helpas ne tre, do
 gutas sango skarлата, vundoj kaŭzas doloron,
 sed daŭrigas obstine mi la paŝan laboron
 sen ŝancelo, sen dubo, kun konvinka
 kompreno,

ke post ĉiu paŝeto pli proksimas la veno.

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Se iu min demandus, kio estas poezio?
 Respondus mi, la penso, kiu nutras vivon
 mian!
 Donac' de Dio estas poezio!
 Mistero, vero, akvo, pano, spiro!

La poezio— kiel ombro mia
 Apude iras, same ĉion vidas
 Kiel amik' konsolas, trankviligas
 Se mi suferas, "ŝi" sopiras.

Se ploras mi, "ŝi" atenteme vortojn trovas,
 Por ke la vorto ne vundigu min.
 Se mi triumfas, "ŝi" solenas, ĝojas,
 Silentas, se mi ne parolas.

Ornamas sentojn ni, kiel skulptistoj,
 Skulptaĵon kreas el la griza ŝton'
 Malbela seka branĉo, kiun ni forĵetis,
 Ekfloros, bonodoros pere poezia vort'.

Ni kantas poezion kune kaj aparte,
 Ni enamiĝas kaj ŝanĝiĝas dank' al "ŝi".
 Memor' senmorta estas poezio
 Kaj sola amo, kiun ne forgesos ni.

Ni povas skribi pri la ver' kaj revo,
 Instrui tion, kion ne studadis ni.
 Ni iĝas pli feliĉaj en poemoj, verkoj,
 Eĉ se en vivo ne feliĉas ni.

Amik' fidela, ne demandas pri alveno,
 "Ŝi" pretas helpi, revivigi nin.
 Matena sunleviĝo kaj belec' de l' vivo
 Jen amike' eterna, ni kaj poezi'!

Ĝis revido, somero!

Somero "pakas la valizojn",
 Senforta varmo de aŭgusta suno,

Somero estas nia “eta vivo”,
 Sed mi atendas aŭtunon!
 Ĉielo blua, ter’ floranta,
 La mar’ karesa, la ripoz’, sunbruno,
 Feliĉaj kaj liberaj tagoj,
 Sed mi atendas aŭtunon!
 Espero dum la tuta jaro,
 Someraj rondoj, dancoj kune,
 Pardonu min, somero gaja,
 Sed mi pli ŝatas aŭtunon!
 La vento, tondro, uraganoj,
 Diluvo— kiel Dia puno,
 Sopro, senreviĝo, larmoj,
 Sed mi tre ŝatas aŭtunon!

Wally du Temple (Kanado)



Ursa Amuzo

Urso
 Bruna
 metas
 pugon sur
 glaĉeron-
 glitas
 suben
 lavange
 en amaso de
 kristalaj
 neĝoflokoj
 dum lumdancetado
 de boreala aŭroro

Fluganta Museto



museto
 sidas
 sur flava

acera folio,
 kaptata de vento
 portas lin ĉielen
 kiel aviadisto
 de aŭtuna tapiŝo,
 foli-aerodromo

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Saluton al farmisto

(Al ĉiuj farmistoj)

La tero fariĝas via amiko,
 ĝardeno iĝas via ĝojo-portanto;
 la pluvo tute lavas viajn larmojn,
 la suno kaj la luno ĉiam salutas
 vin.

La garbejo atendas vian gloron.
 Saluton, ho bona homo!

Vi forportas la mondan malsaton;
 vi kondukas la mondon al
 manĝotablo.

Longa tago plenas je laŭdkantoj;
 via ŝvito fluanta fariĝas ĝojo.

Lenke Szász (Rumanio)



KAKTO

Dum tago la suno ardas,
 kaj la nokto malvarmas,
 La pluvo estas rara gasto,
 sed eltenas la brava kakto.

Neniu ĝin ame flegas,
 prizorgon ĝi ne bezonas,
 sole vivas ekde semo,
 tiel kreskis por elteno.

Malfavoraj vivkondiĉoj,
 estas por ĝi tuta vivo.
 Ĝi defendas sin per dornoj,
 kaj eĉ havas ankaŭ floron.

Homo, ĉesu la plendadon,
ne forgesu la benadon,
benu vian krudan sorton,
ja ĝi donis al vi forton.

20. aŭg. 2023.

Papos Nascente (Brazilo)



FONTO

Akvo al via soifo,
jen fluanta poezio,
milda klara rivereto,
sur konka mano kareso,
vin satigas spongo-verso
kiu daŭras malseketa
kiam soifa vi revenos
nov-karese vin banos,
degutos kia suka gluto.

Poezio pogute servata
spiron proponas laŭmezure
eĉ disŝiraj animoj
revigliĝante plenvivas!
Venu, klara fonto spruĉas
kvazaŭ senfina Vivo!

En via sino Fonto fluas,
verso likve fluas,
vorto onin varmigas,
elfluas Sun-leviĝo,
freŝa akvo subsune bolanta.

Poezio akvon proponas,
ĉiu verso pura lum'
spruĉas el via kor'.
Fonto mem en via Esto
ekestas Poezio-infano
ĉiam sindonema festo
spruĉas kanto fluanta.



Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Songoj

La vaganto solas senkompana jene,
migrante en mondfino mornplene.
Longnokte mi kuŝas sola enlite,
pasigas tempon en tranco fascinite.

Trove min songe en lulilo ornama,
mi kvazaŭ estas vigla bebo tiama.
Patrino nutris min frandi,
patro vestis min bele dandi.

La lun' subiras, korvoĵo grakas, songe'
malklara,
kiom da memoroj ankoraŭ de la pasinteco
vuala?

Sortoŝanĝo sekvante mian duonvivon jam
svenas,
sed dankemo al miaj gepatroj eterne solenas.

Kiel vaganto soleca kaj mizera,
triste mi trairas en la mondo ekstera.
Longnokte mi kuŝas sola enlite,
pasigas tempon en tranco fascinite.

En la songo mi adiaŭas miajn gepatrojn
larme,
tio estas porĉiama adiaŭo, mi ploras varme.
Patro admonas, ke mi bone manĝu kaj
sinvartu,
patrino aspiras, ke mi frue revenu kaj
bonfartu.

— *Esperantigita surbaze de la ĉina budaisma kanto de Majstro Hongyi (Li Shutong, 1880—1942, la lirikisto), Stephen C. Foste (komponisto) kaj Pekina Anĝelo-Horo (kantistinoj).*

Hajkoj pri l' perdita

1)

Ne indas morno,
l' perdita certe venos

en aliformo.

2)

Kvazaŭ lacertvost'
detranĉita rekreskos:
nevenkebla l' moŝt'.

3)

L' arto de kono:
ne tuj perdu tion pri
moka admono.

4)

Perd' en konkuro
inspiras min klopodi
por plimaturu.

5)

Kial zorgas vi
perdon, se l' tuto temas
pri nur utopi'?

Hajkoj pri kvar sezonoj

Frujara tago!
Salikvergoj flirtadas
super verdtago.
.
Vigla kamparo!
Prosperas scenoj bunte,
ondas flormaro.
.
Ora sezono!
Rikoltoj riĉhaveblas,
eĥas kanzono.
.
Jen blanka neĝo!
Adventon ni kunfestas
je paca preĝo.

Silenta ĉielo

Sunleviĝo kaj lunsuĉo,
tra la mondo pleniĝas inspiro.
En eterna dista foro,
via konturo krepuske suspiras,
feliĉo trovita iĝas tamen doloro.

Kun muta preĝado mi nur deziras

pacigi l' animon de prudento.
Kiam ĉio revenas en silento,
ne plu mi al io alia sopiras.

Sur la stepo kun fluganta vento,
karulo mia migras en lamento.
Ho vento, bonvole milde blovu,
kaj lian mornan kanton trovu!
Ho la luno, bonvolu heligi lin!
Ho fajrlumo, bonvolu varmigi lin!

— Esperantigita surbaze de la ĉina

Tuva-popolkanto.

Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Ĉu li peku foje?

Sovaĝa estas ŝi kaj ĉarma
kaj la rideto fajre varma.
En kiun keston li ŝin metu?
Ĉu li respondon de ŝi petu?

Ho ve, li estas ne plu juna,
kaj lia haŭt' ne sunobruna.
Li nur de fore ŝin admiru
ne tuŝu ŝin kaj ŝin ne tiru.

Edzino lia lin ja ŝatas
kaj hejme ĉio bone statas.
Li kial strabas do al ino,
kaj kuŝas songe jam en sino?

Tre loga estas ŝi kaj ĉarma
kaj la ridet' enigme varma.
En kiun keston ŝi lin metus,
Se li frivolan de ŝi petus?

Ve, ve, li estas malkuraĝa,
kaj eble eĉ ne plu sovaĝa.
Ĉu agu li morale ĉiam,
kaj peku do dum viv'neniam?



Kurt Demmler

Jen mi feliĉas

(kantteksto)

Se mi scias diri ion
kaj aliaj min komprenas,
se starteĵ' ĉiam liberas
por la sekvaj flugoj,

se mi trovas eĉ amikojn,
kiuj staras miaflanke,
kaj se plenas pu' de l' viv'
por soifaj glutoj,

se patrion konas mi
kaj l' patrio min rekonas,
se mi kreskas laŭ heder'
alte je ties turoj,

se ekzistas por mi amo
kaj kvieta lit' siringe,
se veturas mi plenvele
en la vivoŝtormoj,

se mi ĉiun povas ĉiam
ekrigardi kun honesto,
proksimulon fidi povas,
jen mi ja feliĉas.

Jen oni ne devas esti reĝ' de l' mond',
nur de si mem sole!
Jen oni ne avidas famon aŭ monon,
se oni ŝatas sin memrole.

Se mi scias, ke oni bezonas min,
ke mi povas eluzi mian forton
kaj fordonaci ĉiujn miajn
florojn dum momento.

Se mi tion, kion semis mia kant',
vidas flori en fremdaj kapoj
jen mi ja feliĉas.

Jen oni ne devas esti reĝ' de l' mond',
nur de si mem sole!

Jen oni ne avidas famon aŭ monon,
se oni ŝatas sin memrole.

esperantigis **Hans-Georg Kaiser**

Jadranka Miric (Serbio)



Ĵaluzo

Kiam ŝi memoras pri vi,
amiko kara,
al ŝi vekiĝas sento rara.
Melankolio nestiĝas, povra ŝi.

En ŝia animo
tuj ekas ŝtormoj pro timo
ke ŝi perdos vin, kaj ŝi droniĝas en ŝlimo
pro malcerteco sia kaj malkredo en amo
via.

Ĵaluzo estas difekto ŝia
kaj malhelpas la granda amo via.
Pro la granda amdeziro posedata
neeblas al ŝi ĝui en tiom da amodezirata.

Homoj ankoraŭ miras

Griziĝis ĉielo.
Koleris natur'
fulme kaj tondre
atentigis homon.
Danĝeras homa aventur'.

Ekis superkelaj ŝtormegoj.
Malaperis fekunda kamparo.
Frakase falas arbaro.
Riveroj ŝvelantaj inundas

Ivanichka Magharova (Bulgario)



Vespera malĝoj'.
Memoro el l' pasintec'
varmigas koron.

En vintra vesper'
paŝoj vekas silenton.
Ŝi jam foriris.

La nokto frosta.
Blanka kolomb' sur kornic'.
Portas novaĵon.

Proksimiĝas nokt'.
Pado piedpremita.
Bonodoras te'.

Pluvas. Pluvombrel'.
Kato apud l' kameno.
Du tasoj da vin'.

Maro da sonoj
alflugis el senlimoj.
Tenera nokto.

Aŭtuna ĉiel'.
En la sino de l' panjo
l' katid' katzumas.

Vesperkrepusko
ĉiela brilado. Mi
sonĝas la stelojn.

Dezerta hejmo
ĉe l' sojl' solekatido.
Mankas fajrujo

Elena Popova (Bulgario)



Aŭtunaj pensoj

La aŭtuno teksas sternaĵojn de flavaj folioj kun fadenoj de blankaj araneaĵoj. Ĉu pentristo aŭ majstro ĝi estas?

La Aŭtuno origis la foliojn de la arboj, por ĝojigi ilin. La tero akceptis la falintajn kontente. La malriĉulo malgaje klinis la kapon — vintra kaŝrigardas malantaŭ la aŭtuno.

Kolĉiko, vi rememorigas nin pri la venonta malvarmo, sed ĉu vi scias kiom da homoj ne havas eĉ flikitan veston?

Ruĝa rozo

Frumatene mi vidis ruĝan rozon inter dornoj kaj haltis pro miro. Ĝi estis ŝprucita per perloj el la rozo. La suno sendis siajn radiojn por saluti ĝin, kaj la rosgutoj trinkis ilin. Kaj antaŭ miaj okuloj ili kreis magion.

—Bela floro, mi demandis, kiel vi staras inter tiuj ĉi dornoj tute sola? Ĉu vi ne timas, ke ili sufokos vin?

—Kiu timas perdas ĉion, eĉ sian vivon. Ni estis kelkaj arbustoj, sed neniu prizorgis nin. Miaj najbaroj ektimis kaj ili malaperis— forvelkis. Mi volis vivi, do mi kolektis miajn fortojn kaj pluvivis. La dornoj protektas min per folioj kaj branĉoj kontraŭ la vento, ili tenas la malsekecon proksime de mi, kaj mi dankas ilin per la bonodoro de miaj floroj. Ili ankaŭ floras kaj estas utilaj kiel herboj. Kiam niaj burĝonoj malfermiĝas, abeloj kaj papilioj flugas al ni. Birdoj kantas ĉirkaŭe. Mi estas feliĉa!

—Kaj vintre, kiam neĝo falas kaj malvarmo frostigas la Teron, inter la dornoj nudaj, kiel vi vivas?

—Ili konservas la neĝon kaj faras varman litkovrilon. Ni scias kiel venki malfacilaĵojn kune, ne fierante, sed helpante unu la alian. Jen kiel ni pluvivas, revas kaj atingas niajn revojn.

—Pri kio iu floro povas revii?

—Por alporti ĝojon al aliaj!

septembro 2022

Dmitro Lucenko

Estas vi mia amo, kara Kijiv'

(kantteksto)

Tra l' verdaĵo jam drivas

Tago milda al fin',
Krutaj Dnipraj deklivoj
Iĝis karaj por mi.

Flagras revoj en gamo
De l' verda masiv',
Estas vi mia amo,
Kara Kijiv'!

Min kanaoj rigardas,
Ili restu en kor'
Por rakonti pri arda
Mia am' kaj angor'.

Kaptas min sentoflamo
Kaj belas la viv',
Estas vi mia amo,
Kara Kijiv'!

Dormas urbo ĉi-hore
En viola talar',
Super Dnipro ekfloris
Fajroj kiel bidar'.

La vesperon ornamas
Feliĉa motiv',
Estas vi mia amo,
Kara Kijiv'!

Milde naĝas anasido

(Ukraina (lemka) popolkanto)
Hej, milde naĝas anasido,
Milde naĝas laŭ Tisino.
Ne riproĉu min, patrino,
Ne riproĉu min, patrino.

Hej, vi riproĉos malbonhore,
Vi riproĉos malbonhore.
Kaj mi mortos ie fore.
Kaj mi mortos ie fore.

Hej, alilande mi mortfalos,
Alilande mi mortfalos.

Kiu tombon por mi faros?
Kiu tombon por mi faros?

Hej, homoj fremdaj tion faros,
Homoj fremdaj tion faros.
Ĉu vi, panjo, min bedaŭros?
Ĉu vi, panjo, min bedaŭros?

Hej, mi bedaŭros kun doloro,
Mi bedaŭros kun doloro.
Mi vin portis sub la koro,
Mi vin portis sub la koro.

Hej, milde naĝas anasido,
Milde naĝas laŭ Tisino.

Stepan Ĉarneckij

Surherbeje la viburno ruĝa

(kantteksto)

Surherbeje la viburno ruĝa klinis triste sin,
Malgajiĝis ial nia glora land' Ukraini'.
Sed ni kune la viburnon ruĝan suprenigos,
Ukrainan nian landon gloran, hej, hej,
regajigos ni!

Elukrainigis



Petro Palivoda

(Ukrainio)

Nga ExLibris

Mia paradizo

Vi estas la lumturo, la bordo,
Ora branĉo vi estas
Alvokanta al la migranto
Makulita survoje
Per la pinarba aromo
Al viaj valetoj
Mi malsupreniras, haltas mi
Por heligi la okulojn
Per tiu matena freŝeco

Por min transdoni
 Al viaj karesoj de la antaŭkolo
 Ensorĉita pro la revoj
 En tiu diina ludo
 Ke ties tuta soifo
 Estingu kaj
 Eksplodu kvazaŭ akvofonto
 La beateco
 Preĝante al via eliksiro
 En via paradiza ĝardeno
 En via eterna rifuĝejo
 Havante nek serpentojn
 Nek diabloj kiuj povus malhelpi nin

Al la amoro de iu nokto

Vian aromon mi flaras
 La korpo mia malpeze tremas
 La koro mia malrapide batas
 Timante ke vi ne alvenos—
 Ne eraru
 Ĉar mia animo dispeciĝos
 Kaj pli forta ol la morto
 Estas por vi mia deziro
 Mi volas konduki kvazaŭ
 Mi estus en la senranda dezerto
 Aŭ en la insulo plena de maro
 Kie la konsternoj enspiras
 En sia fadeno
 Sur la ŝtonetaro aŭ kotaro
 En la akvo kaj la ŝvito
 Dum la stela kaj luna nokto
 Mi vin amas plej multe ol neniam
 Neniufoje mi amis antaŭe..
 Ni ĝuu la veran amoron
 Sen la vortoj kaj sonĝoj
 Sed nur pasie.
 Neniam mi aldiris vin
 Ke vi virĉevalo estas
 Kaj mi luksadita estas
 Pro alia afero en ĉi tiu vivo
 Ardon ja mi ne havas.
 Tuŝu do min
 Senvorte..
 Dum la sendormaj noktoj

Ni amoru.
 Mi volas transdoniĝi al la nokto
 Kiel tion faras la patrino al sia infano
 Sen iu ajn vorto
 Sen iu ajn pento
 Sen iu ajn kondiĉo
 Mi volas havi vin tute
 Senvestita ĝisoste
 Kaj boli
 Kaj degeli
 Kaj eksplodi
 Kaj esti feliĉa
 Nur ĉar mi ekzistas en ĉi tiu mondo
 Nur ke mi estas kun vi.
 Nur por ĉi tiu momento
 Mi baraktos ĝis la lasta spiro.

Elalbanigis



Bardhyl Selimi
 (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Liu Kezhuang (1187-1269)

Ludo en la luno

—laŭ melodio *Serena muziko*

Per rapida vento flugas
 preter la riverojn mi leĝere
 al la luno fora je mil loj.
 Mi antaŭe konis Chang'e* vere,
 kiu ĉarmas nepudrita nek ŝminkita,
 kun blankhaŭto delikata bele.

Ĉien mi promenas en la lunpalaco
 kaj malsupren mi rigardas jen scivole
 la terglobon en nebulo densa.
 En ebrio mi ekskuas osmantarbon fole,
 tuj leviĝas en la homa mondo
 frida brizo, kiu blovas milde, mole.

**Laŭlegende Chang'e, belulino, post englutado de*

fea pilolo, flugas al la luno kaj vivas tie ĝis nun.

Fang Yue (1199-1262)

—*laŭ melodio Preludo de akva melodio*

Post aŭtuna pluv' serenas la ĉielo,
 montoj kvazaŭ purlavitaj verdas ja des pli.
 Mi vagadas sola de la nord' al sudo,
 plensarĝita per ĉagrenoj kaj kun nostalgi'.
 Ilin mi fordrinkas vol-ne-vole ĝis ebri'.
 La boat' veturas inter fragmitaro jam mil
 liojn.

kaj hejmenreveno mia jen fariĝis iluzi'.
 La sovaĝanseroj flugas norden sen kunporti
 mian vortojn al la hejm', kun apati'.
 Per ebria okulpar' mi malfacile vidas
 trans riveroj la hejmlokon jen kun mia
 famili'.
 Sub lum' de subiranta suno mi suspiras
 plenĉagrene kun ĝemkri'.

Trans sabl-strando montoj dronas
 en maldensa nebulo de vespero,
 splenaj kvazaŭ jen kun sulkigitaj brovoj.
 La paseoj de merito kaj despero
 nur aldonas al vi ja ĉagrenojn,
 ĉar eĉ la famuloj kuŝas sub la tero.
 En vidkamp' tiamaj salikarboj svenas
 kaj nur pluvnebulas samas en aero
 kiel la antaŭa senŝanĝeme.
 Kiom da bravuloj ja en efemero
 ludis sur scenej' homviva ĝis pereoj?
 Sola restas mi ankoraŭ kun fiero,
 kaj mi spronas la ĉevalon ja antaŭen
 en la okcidenta vento, sen ŝancelo.

Wu Wenying (1212?-1274?)

—*laŭ melodio Ruĝigitaj lipoj*

Venteg' disblovas densajn nubojn
 el la ĉiela blu' senspure.
 La luno ŝajnas lavitiĝi ĉe vespero
 per pluva akvo tute pure.
 En la malhela nokt' nenia polvo
 leviĝas en aero dense lule,
 jen malgraŭ ke belinoj faras

paŝetojn sur la mola ter' plezure.

Denove mi revenas post disiĝo
 al la ĉefurbo imperia.
 Lanternoj brilas same kiel lastajare,
 sed mia kor' estas melankolia
 Mi nur enŝovu min en litkovrilon
 en bonodora incensfumo stria
 por ke muzik' de flutoj ne min ĝenu
 en dolĉa sonĝo fantazia.

—*laŭ melodio Silk-lava roĵo*

En sonĝo ofte mi frekventas
 malnovan lokon, kie la ĝardeno
 jam plenas je la floroj en densejo.
 Revenas ŝi silenta kun ĉagreno
 ĉe sunsubir' kaj levas kulvualajn hokojn
 per siaj delikataj manoj, kun korpremo.

Salikaj flokoj falas jen senbrue
 en pluv' printempa plorsimila.
 Nuberoj flosas kaj kelkfoje
 la lumon ŝirmas de la luno brila,
 kaj l' lun' eksentas honton pro la ombro.
 En nokto la printempa vento pli korŝira,
 malvarma ol l' aŭtuna vento, kiu
 susuras tra la tero ĝemsuspira.

—*laŭ melodio Pri junulino Zhu Yingtai*

Mi plukas bonodorajn florojn, herbojn
 sur pad' de forlasita la ĝardeno,
 mi sentas fridan spiron
 en la profund' de bambuara ĉirkaŭpreno.
 Knabinoj ludas tordigadon de herb-tigojn*,
 iliaj piedsignoj jen en ĉeno
 videblas klare sur sabla grundo.
 Kompatas mi min pro la ĝeno
 de blankaj haroj ĉe l' tempioj.
 Nun la fastada tago per alveno
 heroldas kulton al prauloj familiaj,
 mi tamen dronas en ĉagreno
 sur fora mont' ŝlosita jen per nub-kateno.

Dumtage mi vivadas en enuo.
 Printempan spiron ŝparas eĉ Ĉielo

al homoj, ĵusa malsereno jam nun
fariĝas delikata pluvo en leĝero.
Salikaj flokoj flirtas super pavilono,
jen tio vekas mian hejmsopiron en korĉelo.
La flora ombro ornamanta l' balustradon
kaj la ĉirpado oriola ĉe perona sfero
verŝajne ja retenas miajn paŝojn,
tuj mia okulparo banas sin en larm-macero.

**Tordigi herb-tigojn estas ludo, en kiu oni elektas
pli aŭ malpli fortajn herb-tigojn por tordigi unu la
alian por testi, kies elektita herb-tigo estas pli forta.*

Elĉinigris



Veĵdo (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO TRIDEK-TRIA

Sub la ĉielo

§33-05

La Taŭo, kiu regas la universon, estas la kvintesenco; ĉio palpebla en la universo estas nefundamenta. La ŝparado faras homajn dezirojn nekcontentigeblaj; la kvietaj kaj simpla vivo estas la principo de la Taŭo. Ĉio ĉi tio estas entenata en la antikva taŭismo, al kiu Guan Yin kaj Laŭzi sin alĉroĉis. Ili ambaŭ dediĉis sin al la praktikado de la antikva taŭismo. Ili starigis siajn vidpunktojn pri “origina ekzisto” kaj “origina neekzisto”, kaj la kerno de iliaj vidpunktoj estas la “absoluta Taŭo”. Ekstere, ili kondutis malforte kaj humile; interne ili havis la menson kvietan kaj malplenan, kiu nutris nenian detruemon.

Guan Yin diris: “Kiam neniaj subjektivaj opinioj loĝas en la interna menso, la objektoj manifestiĝas tiaj, kiaj ili estas. Kiam vi estas en moviĝo, vi estas kiel akva fluo; kiam vi estas en senmoveco, vi estas kiel glata spegulo; kiam vi respondas, via

voĉo estas kiel eĥo. Penu eniri en la staton de tranco, en kiu kvazaŭ nenio ekzistas, aŭ en staton de kvieteco, en kiu regas malpleneco. Miksu vin kun la estaĵoj de la universo, kaj vi atingos la harmonion. Ĉasante materialan profiton, vi perdos vian virton. Neniam metu vin antaŭe de aliaj kaj ĉiam sekvu aliajn.”

Laŭzi diris: “Tiu, kiu konas la masklecon, kaj tamen gardas la femalecon, estas preta fariĝi la ravino de la mondo; tiu, kiu konas la gloron kaj tamen gardas la humiliĝon, estas preta fariĝi la valo de la mondo.”

Dum ĉiu alia penas esti la unua, Laŭzi estis la sola, kiu preferis esti la lasta, dirante, ke li volas porti la humiliĝon de la mondo. Dum ĉiu alia ĉasas senskrupule materialan profiton, Laŭzi estis la sola, kiu preferis alĉroĉi al la nenieco. Ĉar li neniam intence rezervis ion, li ĉiam sentis sin vivanta en abundeco kaj tiel altega, kiel monto. Kion ajn li faris, li faris kun facileco kaj senhasteco. Li praktikis la “senagadon” kaj mokis la homojn saĝajn kaj lertajn. Dum ĉiu alia serĉas feliĉon kaj riĉecon, Laŭzi estis la sola, kiu humile fleksiĝis por la bono de la mondo, dirante, ke li estus kontenta, se li tiele povus esti libera de riproĉoj. Li prenis la profundan komprenon de la Taŭo kiel la bazon, la ŝparemon kiel la gvidprincipon en la vivo. “Ĉio, kio estas malmola, facile rompiĝas; ĉio, kio estas tranĉa, facile malakriĝas,” li diris. Li ĉiam montris sin tolerema por la estaĵoj kaj neniam faris malbonon al la homoj.

Kvankam Guan Yin kaj Laŭzi ne atingis la kulminon de la perfekteco, tamen ili certe estas la plej grandaj taŭistoj kun la plej vasta spirito detempe de la antikveco.

§33-06

La malpleneco lasas neniajn postesignojn; la ŝanĝiĝo signifas nekonstantan formon. Ĉu oni estas mortinta?

Ĉu oni vivas? Ĉu oni kunekzistas kun la ĉielo kaj la tero, kaj ŝanĝiĝas kaj komuniĝas kun la naturo? Kien oni iras, kvazaŭ en tranco, aŭ de kie oni venas? La universo entenas ĉiujn estaĵojn, tamen oni ne scias, kie estas ilia lasta celo. Ĉio ĉi tio estas inkluzivita en la antikva taŭismo, al kiu alkroĉiĝis Zhuangzi. Zhuangzi dediĉis sin al la praktikado de la antikva taŭismo, en kiu li trovis plezuron. Li vortigis siajn opiniojn kaj ideojn per troigitaj kaj senbridaj retorikaj esprimoj kaj aŭdace metis abundon da heterodoksaj ideoj. Laŭ Zhuangzi la homoj en la mondo dronas en plezuroj de la materialaj riĉaĵoj, tiel ke ĉia serioza diskuto kun ili estus neebla. Jen kial li disvolvis siajn ideojn per paroloj laŭcirkonstancaj, respektis citaĵojn el saĝuloj por aŭtentikigi siajn opiniojn, kaj ilustris ilin per fabloj.

Komunikiĝante kun la senfineco de la ĉielo kaj la tero, li ne montris malŝaton al la estaĵoj, nek explore demandis pri pravo kaj malpravo, sed penis harmoniiĝi kun la tuta mondo. Liaj skribaĵoj, stile pompaj kaj strangeaj, ŝokis neniun, ĉar ili estis taktoplenaj kaj neniel kripligis la realon kompleksan. Liaj diroj, ŝajne kontraŭkutimaj sed plenaj de sprito kaj humuro, havis sorĉan forton, kaj liaj paradoksoj indis seriozan konsideradon. Li posedis tian majstrecan inteligenton kaj lia fantazio estis tiel senbride vigla, ke li, komencinte verki, ne povis veni al la fino. Supre li vojaĝis kun la Kreinto; malsupre li amikis kun tiuj, kiuj restis indiferentaj por la morto kaj la vivo, la fino kaj la komenco. Liaj eksplikoj kaj interpretado de la Taŭo estis vastaj kaj brilaj, profundaj kaj penetrenantaj. Lia doktrino, harmonia kaj adekvata, atingis la pinton de la Taŭo. Plie, liaj teorioj pri la ŝanĝiĝado koncerne la fizikan mondon kaj liaj analizoj estis senlimaj kaj liberaj de ĉiaj katenoj de konvencioj. Ili estis originalaj kaj logikaj, profundaj kaj misteraj, tiel ke neniuj povis

sondi ilian fundon.

§33-07

Huizi (Hui Shi) havis vastajn sciojn en multaj regionoj. Li skribis tiom multe, ke liaj verkoj sufiĉis por plenigi kvin ĉarojn, sed multaj el liaj ideoj heterogenaj estis eraraj, kaj liaj paroloj ne estis trafaj.

Observante kaj analizante la estaĵojn kaj la aferojn en la mondo, li diris:

“La senfine granda havas nenian limon kaj tial ĝi estas nomata ‘granda infinito’; la senfine malgranda havas nenion en ĝi kaj tial ĝi estas nomata ‘malgranda infinito’.

“La io, kiu havas nenian dikecon, ne povas akumuliĝi en volumenon, sed ĝi povas esti senfine etendiĝi.

“Rigardate el la universala vidpunkto, la ĉielo estas tiel malalta kiel la tero, kaj la montoj estas tiel ebenaj, kiel la lagoj.

“Tuj kiam la suno atingas sian zeniton, ĝi jam dekliniĝas; la naskiĝo estas la komenca punkto de la morto.

“La granda simileco diferencas de la malgranda diferenco, kio estas la etaj similecoj kaj la etaj diferencoj; la estaĵoj estas inter si tute similaj kaj tute diferencaj, kio estas la grandaj similecoj kaj la grandaj diferencoj.

“La sudo estas senfina kaj tamen ĝi havas la finon.

“Iri al la regno Yue hodiaŭ povas esti nomata alveni tien jam hieraŭ.

“Aro da ringoj interkunigitaj povas esti malkunigitaj.

“Mi scias, ke la centro de la mondo estas norde de la regno Yan kaj ankaŭ sude de la regno Yue.

“Amu ĉion en la universo, ĉar la ĉielo kaj la tero estas unu tuto.”

Elĉinigris



Wang Chongfang

(Ĉinio)

ĈINESKE

Yi Qiao (Ĉinio)

Frujara belo

— laŭ ĉinesko *Mallongigita melodio*
*magnolia**

Primavero
returnas sur la tero.
Jen super mar'
libere ŝvebas birdar'.

Bunte floras,
kamparo jam fervoras.
Frujara bel'
inspiras nin kun glorhel'.

**Mallongigita melodio magnolia (ĉine: jianzi mulanhua): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.*

Jadranka Miric (Serbio)

Animotuŝoj

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Someraj
gajaj vesperoj
donas al koro varmon
pro la novaj renkontoj,
Vivu ferioj!

Nuntempe
proksimuloj, ve
loĝas eksterlande. Ja,
oldaj anoj restas ĉe
domo enlande.

Gepatroj
aŭ geavoj tre
emocie atendas
novan renkonton. Vere,
tre, tre ekscite.

Geavoj

kiel infanoj
senpripense plenumas
ĉion plenkore. Idoj!!
Ho, kiom da ĝoj'!!!

Sed baldaŭ
pasas ferioj.
Ili restos re solaj,
Ĉi-foje kun korridoj
ĝis novaj vidoj!

Malfrua somero

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Blanketaj
nuboj sur ĉiel'
pendas tutan matenon
super ni. Ventetopel'
malfortas. Ĉiel'

bluiĝas.
Neniu birdo
fluganta. Ĉio kalmas.
En vazo jen, irido!
Bonodoras. Do,

somera
tago agrablas
tuŝoj de sunradioj.
Eĉ bestaro malblekas.
Mi, ja, supozas

pro varmo.
Ŝajne naturo
ripozas iomete.
“Vivu kulturo”
skribas sur muro.

Tenera
suna tuŝado
kiel panja maneto.
Benita donacado.
al kunvivado!

Aŭtune

— laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Blanketaj
nuboj plenkovris
ĉielon frumatene.
La aero freŝiĝis.
Veter' ŝanĝiĝis.

Jen, fine
venis aŭtuno.
Jam falis foliaro.
Ofte kaŝas sin Suno.
Malgajaj Luno.

Somere,
Luno en brakum'
de dancanta stelaro.
Ĝi .ja videblas pro lum'
bril' radianta!

Aŭtune
la venta dancad'
kun foliaro falinta
allogas sen lamentad'
kun tuta revad'!

Vigliĝis
arbaro. Krioj
de infanoj kaj birdoj.
Branĉaro plenas de ĝoj' .
Sur ili turtoj.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Laimundas Abromas (Litovio)



La frenezaj najbaroj

Mi sukcesis.

Revenante post laboro hejmen mi aĉetis en presajbutiko la novan, ĵus eldonitan, numeron de urba gazeto. Ĉiun periodaĵon mi komencas legi de lasta paĝo, de anoncoj. Kaj ĉifoje mi ne ŝanĝis mian kutimon. Mia atento stumblis ĉe unu anonco. Korpon mian trakuris la varmeta ekscitotremo. Mi

tralegis ĝin ankoraŭfoje: „Urĝe oni vendas, aŭ ŝanĝas la kvarĉambran loĝdomon en la trankvila, bela loko. Strato „Amikeco“, nr.111.“

Tiun urboparton mi bone konis. Strato „Amikeco“ situas apud la urba parko, tie susuras malnovaj arboj, kantas birdoj, skvaro, bonodoras floroj. Trankvileco.

Jam delonge mi serĉis pli grandan loĝejon, ĉar kreskis miaj geinfanoj kaj ili bezonis apartajn ĉambrojn. Des pli venas gaste al ni gesamideanoj enlandaj kaj eksterlandaj. Krome mi utiligas „Pasportan servon“.

Kaj jen..., mi jam sur la strato de „Amikeco“. Jen loĝdomo nr. 111. Ĝi estas duetaĝa, kun teraso, belaspekta, ĉirkaŭ la domo – ĝardeno, antaŭ la domo- florbudoj. Ĝi aspektas fabele.

Per la tremantaj fingroj mi premis la ĉepordan sonorilbutonon. Loĝejan pordon malfermis korpulenta, tamen paliĝinta mezaĝa viro.

-Mi koncerne loĝejon...- mi ne kuraĝe ekbalbutis.

-A?- ekspiris li. - Bonvolu...

Kaj vi ne kredos, ni interkonsentis, rapide kaj senprobleme. Kaj nur forirante mi demandis:

-Pro kio ...do... vi vendas loĝejon?

-Ĥe...La kaŭzo estas absolute privata...- strange ekridetis dommastro.

Ni ordigis ĉiujn necesajn dokumentojn, pagis la monon kaj post unu monato ni transloĝiĝis en la novan apartamenton. Ĝi estis komforta, oportuna. En la ĝardeno verdis la pomarboj, pirujo, bonodoris floroj kaj aero, kantis birdoj. Plej ĝojis niaj geinfanoj, ili povis libere kuradi kaj ludi en la ĝardeno...Mia edzino Sonata akvumis florojn...

-Bonan tagon!,- estante interne en la loĝejo, mi ekaŭdis la nekonatan virinan voĉon. La voĉo o-ho-ho -regimenton povas komandi.

-Ni interkonatiĝu, najbarino, - plue krakis la nekonatolino, -113-a loĝdomo, Maria Gapulova, profesoredzino... Kiel vi enloĝiĝis ĉi tie?...Fii! - mi ekaŭdis ŝian voĉon jam ĉe la pordo de nia loĝejo.

-F-i-i-i ! La kurtenoj estas malmodaj... Kaj kio estas tie, en la fenestro? Kion signifas tiu verda stelo? Kaj tiu surskribo „Bonvenon“?

Mi malfermis la pordon kaj suriris la ŝtuparon ĉeterasan por ekvidi tiun, kiu tie ĉi komandas. Mi ekvidis sur la ŝtuparo la ampleksan, nigraĥaran, mezaĥan virinon. Ŝi sen la ceremonioj kritike ekrigardis min. Poste ŝi per fingre piketis mian ventron kaj returnis sin al mia edzino Sonata.

-Fii, kia malgrasa, flaviĝinta... Ĉu manĝi vi ne donas al li?

Ŝi diris, retiriĝis per du paŝoj kaj sendispute konfirmis:

-Alkoholulo! La nazo bluas, kaj eĉ kun la akneto... Sekve la brandon li sitele drinkas!...

Vane mia edzino provis klarigi, ke mi dum dek jaroj eĉ guton ne drinkis.

-Tio des pli malbonas,- ironie ekrikanis profesoredzino. -Se li ne drinkas,- sekve estas flirtemulo, amindumanto.

Poste ŝi pruvis, ke nia filo Peĉjo, lernanto de kvara klaso, avangardulo, estas banditotipa kaj li jam ne iĝos bona homo. Restiginte, en malesperon falintan, mian edzinon kaj plorantan pro la timo Peĉjon, profesoredzino adiaŭis kaj ordone invitis:

-Hodiaŭ je la oka horo posttagmeze mi atendos vin...

Precize je la oka mi puŝis sonorilbutonon ĉe la pordo de najbara loĝdomo.

-Salomono! rigardu, kiuj impertinentuloj nian pordon rompas! - ni ekaŭdis aliflanke de pordo la voĉon de profesoredzino. Poste aŭdiĝis la treniro de babuŝoj. En la porda aperturo montriĝis la kapo de eta maljunulo kun kapra barbeto.

-A?- demandis maljunulo.

-Ni...- duope mi komencis kun edzino.

-A?!- denove demandis maljunulo.

-Pro kio vi tie mallertas? - ektondris la voĉo de profesoredzino jam en koridoro.

La maljunulo fortiriĝis.

-Ĥa, do estas vi? De 111-a... Kio novas? Kion vi diros? Al mi ĉiuj venas pro la diversaj aferoj, por ion pruntepreni. La pordon ni ne sukcesas fermi... Eniru, se vi jam venis...

Ni eniris la apartamenton kaj aperis en la vasta gastejo.

-Salomono! Kafon preparu por ili!

En iu angulo de la gastoĉambro iu eksusuris, malfacile ekĝemis. Pretere, apenaŭ aŭdeble, paŝetis tiu sama maljunulo.

-Ĉu paĉjo?- demandis mia edzino profesoredzinon.

-Kiu? Ĉesu vi!- siblis malkontente la mastrino.- Li estas mia edzo, Salomono Gapulov. Profesoro pri medicino.

Ni malkuraĝe sidiĝis. Sidis ni kaj timis laŭte enspiri, ekmoveti rigidiĝintajn membrojn. Maljunulo alportis kafon. Ni trinkis ĝin kaj interparolis. Parolis, kompreneble, ŝi. Ni, laŭbezone, jesis, aprobis al ŝi.

-Je-es?

-Nee...

-Ĉu povas esti?

-Hmm...

Finfine interparolado flankiĝis pri ni.

-Mi esperas, ke vi estas pacemaj, akordiĝemaj homoj,- la mastrino pikrigardis perokule. - Bona najbaro - ĉiela donaco! Sed kiam trafas ia diablo..., gardu dio!...Ĝis nun ĉi tie, antaŭ vi, en via loĝejo frenezaj homoj loĝis... Do ni satsuferis!!! Dum tri jaroj, ekde kiam ni loĝiĝis en tiun ĉi loĝejon, jam ŝanĝiĝis ĉirkaŭe ok najbaroj.

Mia edzino permane sin apogis sur mian genuon. Mi kuraĝige ekridetis.

-Ĉu vi ridas?!- ekkriis profesoredzino, vidinte mian rideton. - Vi ne scias, kio okazas ĉi tie, ĉirkaŭe.

Kaj ŝi, apogante sin al seĝa dorsapogilo, ekkriis:

-Salomono! Kiel nomiĝis tiu kurbnazulo el 115-a, tiu instruisto pri muziko?

-Butkus,- alflugis mallaŭta respondo el la apuda ĉambro.

-Malsaĝulo! Butkus estis tiu, kiu loĝis trans la strato, en 112-a loĝejo kaj li ne estis instruisto.

Profesoredzino iomete cerbumis kaj tuje diris:

-Jen, mi rememoris. Mateo estis nomo de tiu krianto, la plej terura krudulo, malĝentilulo. Li per sia kriado „kantado“, perturbis trankvilecon por loĝantoj de nia tuta strato. Lia edzino surhavis abomenkoloran ĉapeton... Estis ili tre neakordiĝemaj homoj... Eĉ al niaj fenestroj ili ne rigardis preterirante. Mi provis alparoli ilin, sed ili rifuzis, rikanis... Mi provis ilin instrui... Nenia rezulto! Tiam mi ne plu toleris: komencis li gamon elbuŝigi, mi - la hundan

